# La Riverego

Printempo de 2001 | Esperanto-Societo Kebekia | Nro 62, Jaro 16a


# KAMPANJO EICHHOLZ

*Zdravka Metz décrit les derniers mois de la campagne Eichholz, du nom d'un espérantiste qui a légué un important héritage d'imprimés sur l'espéranto à l'Association canadienne d'espéranto.*

Kiam mi proponis la nomon "Kampanjo Eichholz" en julio 2000, mi ne sciis ke tio estos la lasta donaco kiun ni povintis fari por Lanco, Rudiger Eichholz. Kiel vi ja scias, li donacis grandan stokon de E-libroj por la movado. Ni sendis al li tiun Riveregon (n° 59) kiu ja priskribis la kampanjon. Nur post la ferio ni eksciis ke Lanco pace mortis la 5-an de aŭgusto 2000.

Ĉi-foje mi ŝatus priskribi kion ESK faris por tiu kampanjo.

Estraro decidis ke ESK financu la dissendadon de la libro "Esperanto en moderna mondo"(EMM) al siaj membroj. Pro tio atingis vian domon po du libroj en montreala regiono kaj po tri libroj tra Kebekio kaj ricevis ĝin ankaŭ la membroj loĝantaj en Usono, Japanio, Francio kaj Meksikio.

Ni ricevis ankaŭ reagojn de ESK-membroj kiuj donacis monon - 265,00 dolarojn - kaj ni elkore dankas al ili ĉar tio helpis por dissendi du aŭ kvar librojn al esperantistoj en Mezameriko.

ESK dissendis ĝis nun (februaro 2001) entute 338 librojn. Ankoraŭ, dank'al informoj ĉe retpaĝo, ni ricevas petojn por ricevi la libron de novaj retpoŝtaj komencantoj aŭ simplaj interesuloj

Kelkaj membroj informis nin al kiuj bibliotekoj aŭ personoj ili donacis la libron. Tre volonte ni ŝatus scii kion vi faris. Nur tiel la raporto pri la kampanjo estus pli kompleta.

Mi diru ankaŭ ke restas ĉirkaŭ 300 libroj EMM, sed ni havas pliajn esperantajn librojn - inter kiuj multnombraj estas instru-libroj de Vilma, Sindona Eichholz "En novan mondon" numero 1 kaj 2, "Saluton amiko-olimpikaj ludoj en Montrealo", same kiel libroj en la angla "Life of Zamenhof", "Esperanto for beginners" kaj "Tourist phrasebook" Se vi volas ricevi, bonvolu sendi 5$ kaj ni preparos la pakaĵon.

> **ESK dissendis ĝis nun entute 338 librojn!**

Al ĉiuj kunlaborantoj kaj subtenantoj, grandan dankon!

La raporto ne estus justa se mi ne mencius ke KEA aliĝis siaflanke por la kampanjo kaj ekis ĝin per sendado de leteroj al la membroj en oktobro. Kolekto de mono (1282,72$) ebligis dissendi 694 librojn al multaj membroj tra Kanado, en Afrikon, Azion kaj Sudan Amerikon. En decembro la kampanjo diskoniĝis internacie kaj ni nun ricevis informon pri donacoj ĉe libro-serva konto ĉe UEA kaj tiel ni povos daŭrigi dissendadon.

Por mi mem, ĉiu peto por EMM estas ĝojo, malgraŭ la fakto ke mi devas enpaki la librojn, porti ilin ĉe poŝtoficejo, noti senditan kvanton kaj poŝtelspezojn, fari inventarion.kaj fine skribi ĉi raporton, do preni la tempon.

Mi kompreneble daŭrigos ĉi laboron ĉar la libroj ankoraŭ okupas spacon en la kelo.

Tamen, nun jam estas eĉ ebla kaŝi librojn kiam estas iu speciala evento - kiel ekzemple por Zamenhofa vespero kiam ne nur venis pli ol 20 esperantistoj sed ankaŭ ĉeestis kvar personoj de la televido por filmi nin. Mallonga raporto estis prezentita ĉe la franclingva televido de Radio-Canada, la vendredo 26-an de januaro.

Kampanjo Eichholz 2000 signifas ankaŭ pli bonan organizon de la biblioteko en Montreala E-domo dank'al nova bretaro kiun ni decidis konstrui en la somero pro donacitaj libroj por la biblioteko. Ni reorganizis ankaŭ la spacon por ebligi tranoktadon de unu aŭ du uzantoj de PS. Se vi vizitos Montrealon kontaktu nin.

*Zdravka Metz*

# Sur la reto...

*Radio Estonia*

### Ĉesiĝos eperantlingvaj elsendoj el Tallinn

Pro ekonomiaj kialoj estraro de estona radio planas venontjare ĉesigi multajn programojn.Inter ili estas ankaŭ nia ĉiusemajna esperantlingva elsendo. Ni alvokas niajn aŭskultantojn sendi protestleterojn al la estraro de ER.Multaj reeh'oj povas helpi nin.engliŝ@er.ee

Estas kreita nova retlisto "Reta grupo de kanadaj esperantistoj" ^ce la servilo egroups.ca - Adreso de la grupo: esperanto-ca@egroups.ca (Uzadon kaj regulojn de E-lingvaj dissendolistoj vi trovas en Eventoj-197 aŭ ĉe http://www.eventoj.hu/snd-list.htm )

### Hejmpaĝo en E-o fare de japana mezlernejo.

Mezlernejo KIGAKU, Iwate, Japanio, havas sian hejmpaĝon en E-o. En la lernejo lernas 14 geknaboj, de 13 ĝis 16 jaraĝaj. Vizitu la paĝon: http://www.rnac.ne.jp/~kigaku/jkigaku.htm kaj sendu kulaĝigan leteron!

*Interredaktore*

### UEA kandidatigita por la pacpremio de Nobel

Universala Esperanto-Asocio estas kandidato por la ĉi-jara Pacpremio de Nobel. Lau provizoraj informoj, UEA estis kandidatigita de membroj de registaroj au parlamentoj almenau el Francio, Korea Respubliko, Kroatio kaj Litovio, kaj de proponrajtaj universitataj profesoroj almenau el Ĉehhio, Hispanio, Korea Respubliko, Kroatio kaj Usono.

*UEA*

### 1161 ADRESOJ EN PASPORTA SERVO

La ĉi-jara adresaro de la plej fama servo de TEJO, Pasporta Servo, nombras 1161 gastigantojn 80 landoj. En 2000 la reto de gastigantoj konsistis el 1075 adresoj en 76 landoj. En du jaroj la reto kreskis preskau je unu kvarono, ĉar en 1999 ĝi ampleksis 945 adresojn. Francio okupis la unuan lokon kun 103 gastigantoj kaj Germanio la duan kun 94. Rusio, kie en 2000 estis plej multe da adresoj, havas 87 gastigantojn.

Aliaj landoj kun multaj adresoj por vojaĝantaj esperantistoj estas Pollando (63), Britio (52), Usono (49), Ukrainio (48), Brazilo (46), Japanio (41), ktp.

En la bele presita 198-paĝa poŝlibro troviĝas, krom la adresoj kaj aliaj informoj pri la gastigantoj, ankau mapoj kun indikoj pri ĉiuj lokoj kun gastigantoj, tiel ke eblas facile plani sian vojaĝon. Enestas ankau reguloj kaj konsiloj pri la uzo de la servo kaj aliaj utilaj adresoj.

Esperantistoj, kiuj membras en la Pasporta Servo, rajtas senpage tranokti ĉe la gastigantoj. Membro de Pasporta Servo estas ĉiu kiu posedas la adresaron. Gastigantoj ricevas la libron senpage, aliaj povas aĉeti ĝin.

La ideon pri Pasporta Servo, tiam sub la nomo Programo Pasporto, prezentis la argentinano Ruben Feldman Gonzalez en 1966. La unua adresaro lau la nuna sistemo, kun 40 gastigantoj, aperis en 1974 sub la gvido de Jeanne-Marie Cash el Francio. Ambaŭ pioniroj troviĝas inter la gastigantoj ankau en la plej nova eldono. La nuna administranto de la servo estas Derk Ederveen el Nederlando.

La adresaro estas aĉetebla ĉe la libroservo de UEA. La prezo estas 10,80 euroj plus afranko (plus imposto de 6% en EU). Ekde 3 ekz. oni ricevas trionan rabaton.

*NUN*


La Riverego (Le Fleuve) est publié par la Société québécoise d'espéranto en mars, juin, septembre et décembre. Dépôts légaux: Bibliothèques nationales du Canada et du Québec. Premier trimestre 1986. ISSN 0830-9574. Le contenu des articles est sous la responsabilité des auteurs. La reproduction des articles est permise, avec mention obligatoire de la source. Photocopié à 90 exemplaires. Gratuit pour les membres de la Société québécoise d'espéranto. Autrement, l'abonnement annuel est de 10$.

La Riverego estas eldonata de la Esperanto-Societo Kebekia en marto, junio, septembro kaj decembro. Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Oni rajtas kopii la artikolojn, kun nepra indoko de la fonto. Fotokopiita 90oble. Senpage por la membroj de la ESK. Por aliaj, la jara abono kostas 10 kanadajn dolarojn. UEA-doko de la Societo: kebk-d.


**Échéance pour le prochain numéro/Limdato por la venonta eldono: 2001.06.15**


Rédacteur en chef/Ĉefredaktoris Jessy LaPointe. Ont collaboré à ce numéro/Kunlaboris al tiu ĉi numero Normand Fleury, Zdravka Metz kaj Sylvain Auclair (Korektado). Administrateurs de la SQE/Estraranoj de ESK: Normand Fleury (président/prezidanto), Sylvain Auclair (vice-président/vicprezidanto), Jessy LaPointe (secrétaire/sekretario), Zdravka Metz (trésorière/kasistino), kaj Yvon Roux.



Esperanto-Societo Kebekia/Société québécoise d'espéranto
6358-A, rue de Bordeaux
Montréal (Québec)
H2G 2R8
Telefonrespondilo kaj telekopiilo/Répondeur et télécopieur: (514) 272-0151
gajulo@hotmail.com
http://www3.sympatico.ca/esperanto

# Historieto de Okemo

*Normand Fleury nous propose ici une petite histoire des rencontres automnales d'Okamo.*

*Normand Fleury*

1993: Dum la ELNA-kongreso, julio 1993 en Hartford,CT, okazis diskuto pri la ebleco organizi renkontiĝon por la esperantistoj el Kebekio, Ontario, NovJorkio kaj NovAnglio. Konkludo estis ke la renkontiĝo okazu ĉiujare samdate kaj samloke. En mia letero sendita 1993-08-05 al la diversaj E-kluboj en Nordorienta Usono, mi proponis la Kolumbus-semajnfino (Usono) kiu samtempas kun la Dankfesta semajnfino (Kanado), kiel dato por la evento. La proponita nomo estis "Triangula renkontiĝo" ĉar la esperantistoj venus el la Nordo (Montrealo), la Sudo (NovJorko) kaj la Oriento (Bostono). La renkontiĝo ne okazis en en oktobro 1993 ĉar ne estis trovita taŭga loko.

1994: En marto, estis sendita dua letero pri la Triangula Renkonti^go. Malgraŭ sufiĉa intereso en la afero, ne estis trovita taŭga kunvenejo ĝis la somero. Tiam, mi trarigardis amason da turistaj broŝuroj el NovAnglio sed neniu gastejo ŝajnis taŭgi. Mi do, simple uzis mapon, faris liniojn inter Montrealo kaj NovJorko kaj inter Toronto kaj Bostono. La geografia mezo estis apud White River Junction en suda Vermonto. Mi rimarkis la nomon "Okemo Mountain" en Ludlow kaj la nomo tuj plaĉis al mi pro ĝia esperantisteco. Esplorante la informilojn mi trovis la Okemo-Skiejon kaj elektis ĝin por la unua "Aŭtuna Renkontiĝo Esperantista" (ARE). Sekvis vigla varbado, preparado de kompleta programo kaj mendo de kunvenejo. La 1-a ARE estis plena sukceso de la 8-a ĝis la 10-a de oktobro. Alvenis 23 esperantistoj el Kanado (Otavo, Halifakso kaj Montrealo) kaj pliaj 5 familianoj (neesperantistoj) kaj 20 Usonanoj (Bostono, Albany, Hartford, NovJorko, ktp). Partoprenis ankaŭ Germano, Honkongano kaj Meksikano kiuj tiam momente vivis en Montrealo. La plej fama gasto dum ARE estis D-ino Marjorie Boulton el Britio. Ŝi prelegis 3 foje dum la semajnfino; La subtaksata grandeco de Zamenhof, Prepozicioj petolas kaj korelativoj kapriolas, Kiel ni altigu la nivelon de nia lingvo-scio? Cetere okazis kursoj por komencantoj kaj pluraj aliaj prelegoj kiel Internacia asocio pri kulturo kaj edukado de Mark Fettes, Simpozio pri internaciaj familioj kaj Internacia edukado de Zdravka Metz kaj pri Koreio (IJK kaj UK) de Normand Fleury.

1995: La 2-a ARE samloke estis pli bone planita pro antaŭa sperto. La programo estis pli varia kaj la kursoj tri nivelaj tiel estas por komencantoj, progresantoj kaj spertaj esperantistoj. Krom diversaj prelegoj; Transitivaj kaj netransitivaj verboj, E. ĉe komputora reto, Toleremo, ktp. kaj kursoj la vesperoj estis interesplenaj kun amuza interkona vespero (ludoj, kantado, koncerteto muzika) kaj varia kultura vespero (skeĉoj, popoldancado kaj lumbilda prezentado pri Sanktulara Tago). Ĉeestis 20 Kanadanoj kaj 13 Usonanoj.

1996: La 3-a ARE (12-a ĝis 14-a de oktobro) fariĝis la plej malgranda pro la alveno de nur 25 esperantistoj, 7 el Kanado kaj 18 el Usono. Fakte eblus diri ke la tria ARE estis la montreala-novjorka semajnfino. La etoso certe estis amikega kaj la programo varia sed ni konkludis ke necesas pli viglan varbadon ĉar estas granda laboro pretigi kursojn; Mazi kaj Gerda malaperis kaj prelegojn, ktp.

1997: Jen la plej granda ISE ĉar la nomo ŝanĝiĝis al Internacia Semajnfino Esperantista sed fakte ĉiuj parolas simple pri "Okemo". Nu, esperanto estas centdekjara kaj ni havis la honoron gastigi Gesinjorojn Piron el Svisio. Danke al lia famo alvenis 72 esperantistoj inter kiuj 31 el Kanado, 37 el Usono kaj po 1 el Japanio kaj Germanio. koruson, lumbildojn pri ĉinaj lanternoj kaj multe pli.

1998: Jam la 5-a ISE kaj ni bankede festis. La tradicia komuna dimanĉa vespero fariĝis la plej agrabla sperto dum la semajnfino kun bunta vespermanĝo. La alportitaj manĝoj kaj ĉefe la magia etoso kiam oni manĝas ĉe longega tablo kun 50-o da homoj kreas belan memoron por ĉiuj.

1999: Jam nun "Okemo" estas tradicio kun kursoj dunivelaj kaj diversaj prelegoj kiel; "Unu plia jaro en Esperantio de Bill Maxey, E. en TTT de Arnold Victor, Star Wars kaj sia mitologio de Pamela Lieber, ktp. Aldoniĝis oratora konkurso gvidata de Zdravka Metz kaj matenaj naturpromenoj sub la gvidado de Normand Fleury. La tradiciaj bonaj vesperoj interkonaj kaj kulturaj plene sukcesis kun buntaj programeroj. Ĉeestis 11 Kanadanoj, 29 Usonanoj (paro el Seatlo) kaj Franco, do sume 41 esperantistoj.

2000: Kun la temo "Nova jarmilo por esperanto" 47 esperantistoj ĝuis la amikecan etoson de la 7-a Internacia Semajnfino Esperantista. Alvenis 14 homoj el Kanado, 32 el Usono (Kalifornio kaj Florido ankaŭ) kaj Kolombiano. Necesas noti ke ISE aŭ "Okemo" allogas esperantistojn el plej diversaj urboj en Nordorienta Usono kaj ke ĉiam alvenas pli ol deko da novaj esperantistoj. ISE estas nun organizita plene rete tiel estas ke la varbado, planado, organizado kaj enskribiĝoj okazas danke al la interreto. La stelo de la semajnfino estis Amanda Higley el Kalifornio kiu prelegis pri "Unu jaro da vojaĝado tra Eŭropo pere de E. kaj Revivigado de E.-movado en NordAmeriko. Krome la oratora konkurso okazis kun pli granda partopreno danke al vigla gvidado de Zdravka Metz, gejunuloj organizis banadon en apuda naĝejo

# 86-a Universala Kongreso de Esperanto Zagrebo, 21-28 de julio 2001

*Voici quelques notes concernant le 86e Congrès universel d'espéranto, qui se déroulera du 21 au 28 juillet 2001 à Zagreb, en Croatie.*

Alta Protektanto: La prezidento de Respubliko Kroatio, Stjepan Mesic akceptis esti la Alta Protektanto de la 86-a UK, enirante tiel la riĉan liston de ŝtatestroj en tiu funkcio kaj simbolante la vastan subtenon al Esperanto en Kroatio.

Poŝtmarko: La kroata poŝto omaĝos la 86-an UK per porokaza poŝtmarko. Temos pri la unua UK-rilata poŝtmarko de post 1990.

Kongresejoj: Oni kongresos paralele en du lokoj: la eleganta koncertejo "Vatroslav Lisinski" kaj la proksima Elektroteknika Fakultato. Kelkaj programeroj okazos ankaŭ aliloke.

Vizoj: Indas jam nun esplori ĉe la plej proksima kroata ambasado/konsulejo kiuj vizo-kondiĉoj validas por oniaj lando kaj kazo. La kondiĉoj povos rapide ŝanĝiĝi. La aliĝintoj kiuj bezonos vizon, ricevos oficialan invitilon.

Loĝado: Zagrebo abundas je altklasaj hoteloj kun relative moderaj prezoj (40 ĝis 120 EŬR). Studentaj loĝejoj, sufiĉe proksimaj al la kongresejoj kaj kun komforto de 2- kaj 3-stelaj hoteloj, kostos 20 ĝis 40 EŬR. Estos ankaŭ malpli kostaj loĝeblecoj por grupoj kaj gejunuloj (detaloj ĉe la konstanta adreso). Plenaj informoj kun mendiloj troviĝos en la Dua Bulteno (aperota januare 2001).

Ekskursoj: Oni antaŭvidas tri antaŭ- kaj post-kongresajn ekskursojn, ĉefe laŭ la rava kroata marbordo: Istrio kaj Kvarnero, Meza Adriatiko kun arkipelago Kornati, Suda Adriatiko kun Dubrovnik. Inter la tuttagaj ekskursoj elstaras la famegaj Lagoj de Plitvice, Kumrovec (la naskiĝloko de Tito), la montara Zagorje-regiono kaj la cikonia vilaĝo Ĉikoŝ.

Junulara programo: Interesitoj kaj amasloĝemuloj kontaktu la lokan prizorganton: Irina Barac, Ozaljska 112, HR-10000, Zagreb irina.barac@yahoo.com aŭ ibarac@inet.hr; tel. +385-1-363 5564, portebla tel.: +385-98-414168.

Infana Kongreseto: IIK akceptas E-lingvajn infanojn 6-13-jarajn. Ĝis la jarfino validas favoraj kotizoj. Oni bv. kontakti la komisiiton Stefan MacGill (Bethlen u. 2, HU-2030 Erd, Hungario (stefan.macgill@galamb.net) aŭ peti informilon ĉe la CO.

Aliĝoj: Ĝis la 25-a de oktobro estis 325 aliĝoj el 40 landoj. Kvankam la unua granda aliĝ-ondo venos jarfine, la pintaj landoj verŝajne jam nun distingiĝas. Apud Kroatio (26) temas pri Germanio (33), Japanio (16), Nederlando (15), Francio (14), Brazilo (13), Italio (11) kaj Pollando (10).

Kotizoj: Ĝis la jarfino validas jenaj kotizoj (ĉiuj sumoj en eŭroj):
Individua membro de UEA (IM): 120 [landoj de tarifo B: 90]; ne-IM: 150 [112]; junulo/kunulo/handikapito/komitatano: 60 [45]; samaj kategorioj por ne-IM: 90 [67].

## Pledo por plueldono de presita "El Popola Ĉinio"

En la oktobra numero de la konata revuo "El Popola Ĉinio" estas anonco pri la ĉesigo de ĝia eldonado en la ĝisnuna papera formo. Estonte la revuo aperos nur en la elektronika reto, kie ĝi estos senpage rigardebla, ĉe http://www.ĉina.org.cn/world/.

Ĉar dum 50 jaroj EPĈ fariĝis tre konata kaj ŝatata inter esperantistoj, mi petas ĉiujn abonantojn kaj ŝatantojn de tiu revuo, ke ili bonvolu skribi al la ĉina ambasadejo en sia lando por esprimi sian bedaŭron kaj sian deziron plu ricevi la revuon ankaŭ en la nuna formo.

La letero estu pozitive vortumita, tio estas: ĝi emfazu la altan kvaliton de la revuo, ĝian utilecon por ekkoni Ĉinion kaj ĉinajn problemojn, kaj la ĝeneralan ŝaton de ĝi fare de la legantoj, ktp. Fine de la letero oni esprimu la deziron, ke la kompetenta registara instanco repripensu la decidon kaj ebligu pluan aperon de la papera versio de "El Popola Ĉinio".

Mi ankaŭ instigas ĉiujn, kiuj havas tiun eblecon, regule mem legi kaj diskonigi al aliaj la retan version de EPĈ ĉe www.ĉina.org.cn por montri ankaŭ tiel la popularecon de la revuo inter esperantistoj.

Dankon pro via kunlaboro!

Renato Corsetti,
Vicprezidanto de UEA

# La angla avantaĝo

*Den Drown <den.drown@sabre.com>*

Mi bonŝancas lastatempe en mia vivo per havi la okazon multe vojaĝi en Euxropo pro mia laboro. Mi estas usonano, kaj tial, amiko mia en Germanio diris al mi ke mi havas avantaĝon ĉar mi jam denaske parolas tion kion ni plej-proksime havas kiel internacian lingvon: la anglan.

Mi supozas ke li pravas, sed tamen, mi trovas min entute nevola pri tiu avantaĝo.

Mi estas civitano de Usono, kaj mi tre fieras pri tio. Mi fieras ankaŭ pri tio ke ni estas tre grava lando en la hodiaŭa mondo. Tio pri kio mi ne fieras estas la maniero per kiu ni daŭrigas tiun gravecon. Temas ĉi tie pri la uzado de la angla lingvo en nia mondo per interkomunikilo. Mi havas avantaĝon. Ni usonanoj havas avantaĝon.

Ni estas la elito, ni regas tra la tuta mondo, kaj ni daŭrigos, ĉar ili, la ceteraj, neniam povos komunikiĝi tiel bone kiel ni. Ili laboras dum jaroj kaj dekjaroj. Neniam ili atingos nian staton. Ni estas la elito.

La alilingvuloj? Ili ofte pensas ke ili perfekte uzas nian lingvon, sed inter ni, ni kaŝe komentas kaj ŝercas pri iliaj eraroj. Mi volas kriegi al ili, "Ĉu vi ne kapablas vidi kion vi faras? Estas vi, kiuj forprenas vian povon komunikiĝi! Estas vi, kiuj daŭdaŭe metas nin super vin." Kaj super ili ni restos. Ni estas la elito kaj ni regas la mondon.

Mi ne kontentas pri esti elito. Jen ĉi tie usonano kiu ne interesiĝas pri esti mondreganto. Mi estas civitano de Usono, sed super tio—jes, super tio—mi estas civitano de la mondo. Vi ĉie, mi rigardas vin kiel geamikojn kaj eĉ gefratojn. Mi ne volas stari super vi pro maljusta avantaĝo. Mi multe pli ĝuus marŝi apud vi, kaj tiel ni povus kundividi niajn kulturojn, unu kun la alia, tiel ni povus esti egalaj, povus respekti nin, unu la alian. Tamen vi rifuzas, vi la alilingvuloj. Mi opinias ke vi blindiĝas al la vero. Homoj ŝajnas malpli inteligentaj ol ili vere estas kiam ili parolas kun persono per ties gepatra lingvo. Claude Piron, esperantisto, donis al mi tiun ideon, kaj mi fojon post fojo vidas ĝin kiam mi laboras eksterlande. Esperanto estas kreita por esti rapide lernebla kaj plej-grave fleksebla tiel kiel ĉiuj povas uzi ĝin sen ŝajni fremda, sen ŝajni stulta. La angla ne! Krom per loĝi dum pluraj jaroj en angla-parolanta lando, vi neniam majstros la nepriskribitajn regulojn, la amason da esprimoj, kaj la subtilajn nuancojn de la lingvo.

Nacia lingvo estas labirinto, konfuziga al la fremdulo. Ĝi estas kiel la tavoloj de cepo, kaj kiam vi komprenas unu aspekton de la lingvo, vi povas certi ke sub ĝi troveblas esceptoj kaj nekomprenitaj nuancoj.

Lernu la anglan. Ĝi estas riĉa kaj belega lingvo, kaj ties diversaj popoloj estas afablaj, kaj iliaj kulturoj estas interesegaj. Sed komprenu nepre ke ĝi tute ne taŭgas kiel internacia komunikilo. Pensu pri la homoj en via lando kiuj eraras kun sia propra lingvo tie. Pensu pri la eraroj kiujn vi mem faras kun via gepatra. Ĉu vi opinias ke nedenaskaj parolantoj kapablas juste konkuri? Ĉu tian maljustan mondon vi volas krei? Ĉu kiel mondcivitanoj, kiel la homaro, ni fieras pri nia mondo?

Mi volus laste aldoni pensiga1/4on pri tiu mondo kiun ni kreas. Mi komencis per paroli pri Usono, mia lando, kaj pri kiel ĝi estas grava lando en nia mondo. Kial ĝi gravas? Mi opinias ke unu el la plej trafaj kialoj estas nia forteco. Ne specife milita forto, sed forto en komerco, diplomataj rilatoj, belartoj, sportludoj, kaj tiom multe da diversaj a1/4oj. Kial ni fortas tiamaniere? Laŭ mi estas tial ke ni estas lando de 50 ŝtatoj. Tiuj ŝtatoj kunlaboras, interkomunikas, kundividas siajn diversajn fortojn kaj tiel formas union multe pli forta ol la sumo de la 50 ŝtatoj mem. Ni nuntempe vidas ke la Euxropa Unio havas la saman konsciiĝon. Mi invitas vin pensi pri nia mondo. Kia ĝi estas? Kia ĝi povus esti se ni la mondcivitanoj povus efike interkomuniki kaj tiel nin interkompreni kaj kundividi niajn diversajn fortojn? Mi diras ke ni ne kapablas krei tian mondon per nacia lingvo kiel interkomunikilo. Bonŝance, ni havas lingvon kiu taŭgas, kiu justas, kiu kapabligas al ĉiu homo deklari "jen mi, mondcivitano, homo el la homaro. Lasu min jenigi kiu mi estas." Jen interkompreno. Jen la ebligo de Esperanto. Jen nia mondo.

# Nous avons un besoin urgent de correcteurs!

La Société québécoise d'espéranto propose depuis un mois son propre cours d'espéranto sur Internet, plus adapté aux besoins des jeunes Québécois qui s'inscrivent de plus en plus nombreux. Vous pouvez d'ailleurs le voir, à <www3.sympatico.ca/esperanto/cge.htm>.

L'équipe de correcteurs est présentement réduite à trois bénévoles, alors que ces cours constituent un puissant outil de diffusion de l'espéranto au Québec.

-Voici quelques explications sur le rôle des correcteurs, qui doivent maîtriser l'espéranto et le français. Ils choisissent eux-mêmes le nombre d'étudiants (normalement, deux pour commencer) et ils reçoivent les exercices des étudiants par courrier électronique.

Pour effectuer la correction, en cas de doute, ils ont droit au concours d'un expert. Après avoir terminé la correction, ils renvoient le tout aux étudiants par courriel.

Contactez Marc Lavertu à kebek@videotron.ca

# Nova studo de Claude Piron

UEA eldonis kiel n-ron 46 en sia anglalingva serio “Esperanto documents” 22-paĝan studon de Claŭde Piron, “Linguistic communication: A comparative field study” (Lingva komunikado: kompara praktika studo). La studo de Piron temas pri kvar diversaj sistemoj de lingva komunikado en internaciaj organiza1/4oj: tiu de Unuiĝintaj Nacioj k.a. organiza1/4oj kun kelkaj laborlingvoj; tiu de multnaciaj kompanioj uzantaj unu nacian lingvon, plej o anglan; tiu de Euhropa Unio uzanta la oficialajn lingvojn de ĉiuj membroj; kaj tiu de organiza1/4oj uzantaj nur Esperanton. Ĉiuj sistemoj estas komparataj laŭ 12 kriterioj, kiel lernodaŭro, necesaj antaŭinvestoj, ne-egaleco kaj diskriminacio, kostoj de kunsidoj kaj dokumentado, perdo kaj distordiĝo de informoj, ktp.

Ĉe ĉiu kriterio la sistemoj ricevas poentojn de malavantaĝeco: 10 kaze de tre serioza malavantaĝo, 0 kaze de ne-ekzisto de malavantaĝo. Sekve, se iu sistemo estus totale malavantaĝa, ĝia poentosumo estus 120, dum nulo indikus ĉiurilate idealan sistemon. Kiel la plej malavantaĝa eliris el la studo la UN-sistemo (76 poentoj) kaj kiel la plej avantaĝa la Esperanto-sistemo (5). La EU-sistemo taksiĝis je 65 poentoj kaj tiu de multnaciaj kompanioj je 39. La ege interesa studo de Piron estas utila lega1/4o por ĉiu, kiu interesiĝas pri la problemaro de internacia lingva komunikado.

La kajero kostas EUR 2,10 (plus imposto en EU kaj afranko). Por mendo de minimume 3 ekz. la libroservo de UEA donas rabaton de 1/3.

CO de UEA, ĉe *Ret-info*

## Rakontu viajn vojaĝojn aŭ viajn gastigadojn sur la reto!

Mi nuntempe estas serĉanta tekstojn de personoj, kiuj vojaĝis uzante Esperanton aŭ kiuj gastigis Esperantistojn de aliaj landoj pere de la Pasporta Servo, kadre de la finpretigado de la retpaĝaro de ESK.

Se vi volas rakonti pri viaj aventuroj aŭ kontaktoj kun eksterlandanoj, bonvolu sendi al mi vian tekston, kiu povas esti tiel longa (aŭ mallonga) kiel vi deziras.

Vi povas povas sendi ĝin poŝte al la adreso de ESK aŭ retpoŝte (mi preferus tion), al la adreso gajulo@hotmail.com.

Mi ankaŭ bonvenigas fotojn, poŝtkartojn, ktp. Ili povos aperi surrete apud via teksto.

*Jessy LaPointe*

# Koresponda Servo Mondskala: 378 petoj en 2000

Unu el la plej gravaj edukaj establoj de la Esperanto-movado, Koresponda Servo Mondskala de UEA, vigle servis la korespondemulojn ankaŭ en 2000, kiam ĝi ricevis entute 378 korespondpetojn el 53 landoj. La nombro da petoj tre varias de jaro al jaro — ekde 1993 inter 362 kaj 579 — depende de hazardaj pintoj en unuopaj landoj. En 1999 KSM ricevis 428 petojn.

Same kiel en 1999, plej multe da petoj venis el Francio, nome 80 (96 en 1999 kaj 70 en 1998). La duan lokon okupis Rusio kun 76 petoj. Ĝi ankaŭ estas la lando, kie la nombro stabile kreskis: 38 en 1998 kaj 56 en 1999. La tria granda kliento de KSM estas Brazilo: 54 petoj en 2000, 39 en 1999 kaj 59 en 1998. Tiuj tri landoj senkompare distingiĝas disde ĉiuj aliaj: sur la kvara loko estas Senegalio kun 10 petoj, sekvata de Germanio, Hungario, Irano kaj Kubo kun po 9 petoj.

De 1990 KSM estas prizorgata de s-ro Francois Xavier Gilbert. La adreso de KSM estas: B.P. 6, FR-55000 Longeville en Barrois, Francio. Informilon kaj aliĝilon oni povas peti kontraŭ unu respondkupono. Por rekte ricevi adresojn de korespondemuloj, oni sendu du respondkuponojn kun detalaj indikoj pri si mem kaj pri la dezirataj korespondantoj.

La retadreso de KSM estas <ksmesperanto@aol.com> kaj oni povas viziti gin ankaŭ per ĝiaj TTT-paĝoj, en 6 lingvoj, ĉe: http://www.multimania.com/kosomo

# Granda publika atento al la UK en Kroatio

La granda atento de kroataj amaskomunikiloj al la 86-a Universala Kongreso en Zagrebo (21-28 julio 2001) montriĝis en la ĉeesto de ok radiostacioj, nova1/4agentejoj kaj gazetoj en la gazetara konferenco pri la UK, okazinta la 15-an de januaro en Hotelo Esplanade. La 1/4urnalistoj ricevis freŝajn informojn pri la kongrespreparoj de Konstanta Kongresa Sekretario de UEA Nikola Rasic, la estro de la Gazetara Servo de LKK Judita Rey Hudecek kaj la sekretario de LKK Spomenka Stimec. La 13-an de januaro la televida elsendo “Bonan matenon!” invitis Judita Rey Hudecek kaj Ankica Jagnjic kun la Esperanto-parolantaj infanoj David Rey Hudecek kaj Tina Tisljar partopreni en rekta elsendo. La esperantistoj gastis en la elsendo lige kun la temo Europa Jaro de Lingvoj 2001. La 17-an de januaro la Kroata Radio invitis Ankica Jagnjic al speciala programo pri la Jaro de Lingvoj. La gazeto “Fokus” petis aldonan intervjuon en la kongresa oficejo por konatiĝi kun la Libroservo.
La 8-an de januaro reprezentantoj de LKK rendevuis ĉe la vicprezidanto de la Parlamento Zeljka Antunovic kaj en la Ministerio pri klerigo por enkadriĝi al la Euhropa Jaro de Lingvoj. Ministrino pri turismo sendis salutmesaĝon por la kongresanoj aperontan en la Dua Bulteno de la UK.

# UEA aŭspicias tutmondan fabelkonkurson por infanoj

Paatalo-instituto, edukejo por amatoraj verkistoj en Taivalkoski, komunumo en Norda Finnlando, organizas fabelkonkurson por finnaj infanoj ĉiujare ekde 1994. Tiu konkurso fariĝis tre konata kaj populara en la lando.
En Metsakyla, vilaĝo en Taivalkoski, de kelkaj jaroj aktivas Esperanto-grupo gvidata de s-ino Aini Vaaraniemi. Laŭ ĝia iniciato, la t.n. vilaĝa asocio de Metsakyla proponis aldonon de Esperanta branĉo al la konkurso de la jaro 2000. Malgraŭ mallonga tempo alvenis 25 verkoj el 8 landoj. Kiel raportis la revuo “Esperanto” (n-ro 12/2000), la publikigo de la rezultoj kaj la ĉeesto de unu el la ne-finnaj premiitoj, Stefani Strunjek el Kroatio kun sia instruistino Judita Rey-Hudeĉek, altiris multe da atento de 1/4urnalistoj.
Pro la sukceso de la unua provo, ankaŭ la konkurso en 2001 havas Esperantan branĉon. La Estraro de UEA asignis al ĝi la aŭspiciojn de UEA por rekoni la gravecon de tiu unika iniciato kaj por kontribui al ĝia diskonigo.
La konkurso bonvenigas fabelojn de infanoj, kiuj jam scipovas aŭ nur studas Esperanton. Estas tri aĝkategorioj: A. infanoj ĝis 9-jaraj; B: 9-11-jaraj; C. 12-14-jaraj. La konkursa1/4oj povas ampleksi maksimume tri tajpitajn paĝojn. Minimuma limo ne estas. La konkursa1/4oj devas alveni plej laste la 31-an de julio 2001 ĉe la adreso:

**Paatalo-Instituto**
**PL 39**
**FI-93401 Taivalkoski, Finnlando**

Oni skribu sur la koverto la vorton “Fabelkonkurso”. Ĉiu konkursa1/4o estu signita per pseudonimo. En akompana koverto estu la vera nomo, naskiĝdato, adreso kaj, se eble, telefonnumero aŭ retadreso.
La rezultojn oni publikigos en la Tago de Fabelo, la 18-an de oktobro, samtempe kun la rezultoj de la finnlingva konkurso. La publikigo estos programero de infana kultursemajno, tradicie okazanta en Taivalkoski oktobre.
Pli da informoj pri la konkurso haveblas ĉe: aini.vaaraniemi@pp.inet.fi

# UEA kaj ILEI en packultura kolokvo de Unesco

Pli ol 130 neregistaraj organiza1/4oj (NRO-j) partoprenis la 24-an kaj 25-an de novembro 2000 en kolokvo titolita “Kulturo de paco: aganta ideo”.

Ĝi okazis en la Unesko-domo en Parizo kaj estis organizita de la NRO-Ligokomitato de Unesko por revui la agadon de la tutmonda movado por kulturo de paco kaj neperforto. Tiu movado estis lanĉita komence de 2000, Internacia Jaro por la Kulturo de Paco.

Krom bilanci la agadon de NRO-j kaj la atingitajn rezultojn dum la Jaro, la kolokvo diskutis ankaŭ kiel plifortikigi kunlaboron inter NRO-j kaj Unesko sojle de la Internacia Jardeko por Kulturo de Paco kaj Neperforto por la Infanoj de la Mondo (2001-2010). La kolokvo laboris en plenkunsidoj kaj ok atelieroj laŭ la ok temoj de la agadprogramo de UN pri kulturo de paco.

Malfermante la kolokvon la ĝenerala direktoro de Unesko, Koiĉiro Matsuura, ĝojis pri la sukceso de la Internacia Jaro por la Kulturo de Paco, dum kiu NRO-j mobiliziĝis por disvastigi Manifeston 2000 iniciatitan de Nobel-premiitoj pri paco. Matsuura aldonis: “Hodiaŭ, unu monaton antaŭ la fino de tiu jaro, ni povas aserti, ke la alvoko estis aŭdita: 72 milionoj da subskribintoj - pli ol centono de la monda loĝantaro - jam aliĝis al Manifesto 2000.”

Tri junuloj: koreino, alĝeriano kaj franco, reprezentantaj la Fonda1/4on Alvoko de Nobel-premiitoj pri Paco por Infanoj, intervenis. Ili atentigis la partoprenantojn pri riskoj de tutmondiĝo kaj petis fini ekonomian militon, kiu mortigas multajn infanojn. Ili konkludis: “Perforto ne funkcias!”

# Diru... Kio okazos?

**Julio 2002**: 87-a Universala Kongreso de Esperanto, en Fortaleza (Brazilo)

**julio 2001:** 86-a Universala Kongreso de Esperanto, en Zagrebo (Kroatio)

**Ni organizas**

**Vendredo, 30-a de marto:** MEK (19h)
**Vendredo, 27-a de aprilo:** MEK (19h)
**Vendredo, 25-a de majo:** MEK (19h)
**Vendredo, 29-a de junio:** MEK (19h)
**Vendredo, 28-a de septembro:** MEK (19h)
**Vendredo, 26-a de oktobro:** MEK (19h)
**Vendredo, 30-a de novembro:** MEK (19h)

**Yvon Roux est le responsable des activités de la SQE à Montréal.**

**Les suggestions pour les prochains mois sont les bienvenues, contactez le au (514) 727-8758.**

! Les membres de la société peuvent emprunter des livres et des revues de la bibliothèque. SVP laisser un message clairement sur le répondeur (514) 272-0151 et nous vous recontacterons pour un rendez-vous. Merci et bonne lecture!

## Rencontres au Québec

Des rencontres se tiennent occasionnellement dans différentes villes: Québec, Sherbrooke, Hull, Chicoutimi, etc. Nous vous invitons à nous contacter pour vous joindre ou former un nouveau groupe local.

**MEK:** ***Montreala Esperanto-Klubo***

La Esperanto-Societo kebekia proponas al vi renkontiĝojn en la oficejo de la strato De Bordeaux. Dum tiuj vesperoj, vi povas diskuti pri iu ajn temo, nur ĝojigante la uzon de la lingvo. Aktivaĵoj povas ankaŭ esti organizataj, laŭvole. (esperanto@sympatico.ca, 272-0151).

La Société québécoise d'espéranto vous propose des rencontres, dans ses installations de la rue De Bordeaux. Dans le cadre de ces soirées, vous pouvez discuter de n'importe quel sujet, pour le simple plaisir d'utiliser l'espéranto. Des activités peuvent également être organisées, si vous en faites la demande. (esperanto@sympatico.ca, 272-0151).

# Nova sekcio: Inter Ni

*La estraro de ESK konstatis, ke estas pli kaj pli malfacile renkontigi esperantistojn, ĉar multaj havas rendevuplenajn taglibrojn aŭ loĝas for de la Esperanto-Domo en Montrealo. Ni ankaŭ ricevas multajn demandojn de kebekianoj en la regionoj kiuj volas korespondi aŭ renkonti samideanojn.*
*Vi povas ankaŭ kontakti nin ĉe la retpoŝtadreso: esperanto@sympatico.ca aŭ voki nin al (514) 272-0151.*

Mi volus interrete korespondi kun aliaj kebekianoj. Mi ankaŭ proponas al vi tion ĉi. Eble vi konas? Ĉe la servo ICQ ekzistas 2 grupoj kie homoj povas interkomuniki unu la aliajn. Ankaŭ ni eĉ povas krei grupon nur por ni. Se ni estas multaj. Eble ni povus esti imitotaj de la alilandaj samideanoj. Mi jam estas en unu el du grupoj mia ICQ numero estas 61393922 kaj mia nomo estas ReG.
Mi scias ke aliaj servoj ekzistas ekz. tiu nomata mIrc, eĉ unu kie ni povas parole interkomuniki sed mi ne estas membro. Tio estas nur sugesto povanta esti interesa por aliaj kebekianoj kiuj volas fratigi unu la aliajn.[Serge Cormier, Sherbrooke, sorpos@hotmail.com.]